A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

N-ro 4/2016 (261)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





Grupeto de partoprenantoj de la 16-a ĈEA-kongreso en Pelhřimov en ĝardeno de la muzea ekspozicio "Oraj ĉeĥaj manoj"

Tisk a distribuci tohoto časopisu finančně podpořil Kraj Vysočina

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz - sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

### Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidanto:** Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumbazo, kontado)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

# 16-a ĈEA-kongreso

Pelhřimov 13 - 16 oktobro 2016

Industria kaj faka mezlernejo en Friedstrato de Pelhřimov gastigis nian 16-an kongreson, kies ĉefa celo estis elekto de la nova asocia komitato.

La aranĝo okazis sub aŭspicio de la regiona hetmano Jiří Běhounek kaj la urbestro de Pelhřimov František Kučera, kun financa subteno de la Regiono Vysočina, la urboj Pelhřimov kaj Pacov kaj de la firmao CIRET.




*Max Kašparů, Pavla Dvořáková, Jiří Běhounek, Miroslav Marek, Vladimír Dvořák*

Proksimume kvardek partoprenantoj venis jam ĵaŭde vespere. Post vespermanĝo ĉiuj transiris al proksima gimnazio, kie estis aranĝitaj libroservo kaj kongresa salono.

La kongreson venis saluti hetmano de la regiono Vysočina Jiří Běhounek kaj direktoro de la loka muzeo de rekordoj Miroslav Marek. Sekve Anton Oberndorfer el Aŭstrio modele prelegis pri graveco de parolado kaj prezentis sian projekton de Esperanta Retradio.

Kantis geedzoj Karaš, nevidantaj esperantistoj el Kamenice n.L., kun sia lerneja kolego.

Vendreda antaŭtagmezo estis dediĉita al busa ekskurso al la kastelo Pacov, kie nin ĉiĉerone akceptis direktoro Vlastimil Simota, kaj al la klostro Želiv kun bierfarejo, kie ĉiĉeronis mem la abato Jaroslav Šimek. Vespere alveturis dudeko da ceteraj kongresanoj.




*Miroslav Smyčka kantas kanton Mississippi*

Ĉiuj povis ĝui interesajn prelegojn de Max Kašparů pri hipnozo kaj de Petr Chrdle pri Suda Koreio, konatiĝis kun nove eldonitaj libroj kaj omaĝis la vivjubileon de la baritonisto Miroslav Smyčka. Eksonis ankaŭ kantoj kun gitaro por aŭskulto kaj komuna kantado en prezento de V.Türk kaj P. Dvořáková.




*Geedzoj Karaš kaj Anton Oberndorfer*

En la sabata antaŭtagmezo okazis la ĉefa kongresa traktado. Unue la prezidanto skizis la kvinjaran bilancon kaj la komitato prezentis raportojn pri la asociaj agado kaj ekonomio. Poste la prezidanto de la elekta komisiono Petr Chrdle prezentis kandidatojn por la nova komitato.

La kongresanoj akceptis jenajn novajn komitatanojn: Libuše Hýblová (prezidanto), Leonarda Chaloupková (vicprezidanto), Vratislav Hirš (kasisto), Libuše Dvořáková, Miroslav Hruška, Miroslav Malovec (komitatanoj). Al la forirantaj komitatanoj, geedzoj Dvořák, estis esprimita danko pro ilia laboro.



*En la klostro Želiv*

Posttagmeze la kongresanoj promenis tra la urbo kun loka ĉiĉeronino Marie Dojavová, vizitis la muzeon de rekordoj, kaj la vesperon finis dancamuzo kun riĉa tombolo en la gimnazia salono.



*Promeno kun la ĉiĉeronino*

La vesperon enkondukis projekciado de la filmo *"Vizitu Pelhřimov - la urbon de rekordoj"*, laŭpete de la urbestro freŝe dublitan al Esperanto far V. Türk. Dancojn prezentis dancgrupo *Thoraya* sub gvido de Inka Prchalová, per sia magio sorĉis iluziisto Martin Hruška kaj por nia dancado kaj kantado muzikis akordeonisto Jan Korba. Dimanĉe antaŭtagmeze okazis diskutoj pri la perspektivoj kaj aktualaj agadplanoj de la asocio.

La kongreson akompanis posttagmezaj klerigaj programeroj: diskutrondoj pri pedagogio kaj informado, laborgrupo pri esperantigo de la retejo de la Muzeo de rekordoj kaj kuriozaĵoj, komputila konsultejo kaj seminarioj pri sonregistraĵoj kaj laŭtlegado de tekstoj. Ties konkreta rezulto kun voĉoj de la partoprenintoj aperis en la programo de la Esperanta Retradio elsendita la 21-an de oktobro.



*En la kastelo Pacov*
*Muzeo de A. Sova kaj de motorcikla sporto*

Danko pro preparo de la kongreso apartenas al Milada Zemanová kaj aliaj membroj de loka klubo Montetaro gvidata de Max Kašparů, kiuj helpis al la ĉeforganizantoj Pavla kaj Vladimír Dvořák. La projekciilon ĉe prelegoj priservis Miroslav Hruška kaj Matěj Nárožný.

*Miroslav Malovec, Pavla Dvořáková*
*fotoj J. Čejková, O. A. Fischer, J. Liška*

# Usnesení sjezdu Českého esperantského svazu, z. s.

**který se uskutečnil v Pelhřimově ve dnech 13.-16.října 2016**

## Sjezd zvolil:

1.členy výboru pro volební období 2016-2019 ve složení:

**Libuše Hýblová** – předsedkyně a statutární orgán, **Leonarda Chaloupková** – místopředsedkyně, **Libuše Dvořáková** ze Svitav – členka, **Vratislav Hirš** – člen a pokladník, **Miroslav Malovec** – člen, **Miroslav Hruška** – člen.

## Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES za období listopad 2015 až září 2016,
2. zprávu o hospodaření za období listopad 2015 až září 2016,
3. bodové zhodnocení pětiletého období ČES,
4. příspěvkový řád v dosavadní podobě.

## Sjezd doporučuje:

1. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost,
2. členům ČES sledovat webové stránky **www.esperanto.cz** a **muzeum.esperanto.cz**,
3. klubům a sekcím dbát na každoroční aktualizaci svých údajů a dbát na provedení voleb svých orgánů v souladu se stanovami ČES,
4. vytvořit elektronickou anketu o místě, délce trvání a termínu konání konference ČES.

## Sjezd vyzývá:

1. všechny členy a organizační složky svazu k přípravě akcí u příležitosti 100. výročí úmrtí dr. Zamenhofa a 130. výročí vzniku esperanta a účasti na nich,
2. členy k větší aktivitě k přispívání do Starta a na webové stránky svazu,
3. zájemce o pomoc s vytvářením Starta, aby se přihlásili výboru.

## Sjezd bere na vědomí:

1. zprávu výboru o Předkongresovém výletu (101. UK v Nitře) konaného ve Svitavách ve dnech 19.-23.7.2016,
2. zprávu o činnosti složek ČES za období listopad 2015 až září 2016.

*V Pelhřimově 16.10.2016*

# La kongresa rezolucio

*(informa traduko)*

**La kongreso elektis** komitaton por la periodo 2016-2019: Libuše Hýblová – prezidantino kaj statuta organo, Leonarda Chaloupková – vicprezidantino, Vratislav Hirš – kasisto, Libuše Dvořáková, Miroslav Malovec, Miroslav Hruška – komitatanoj.

**La kongreso aprobis** raportojn pri la agado kaj ekonomio de ĈEA (novembro 2015 – septembro 2016), pritakso de la kvinjara periodo de ĈEA, la regularo pri la kotizoj sen ŝanĝo.

**La kongreso rekomendas** al ĉiuj ĈEA-membroj propagandi Esperanto-muzeon en Svitavy, subteni ĝian agadon kaj sekvi retejojn www.esperanto.cz kaj muzeum.esperanto.cz kaj krei elektronikan enketon pri loko, daŭro kaj dato de la venonta ĈEA-konferenco.

La kongreso alvokas al omaĝado de la 100-a datreveno de la morto de Zamenhof kaj 130-a datreveno de estiĝo de Esperanto en 2017, al kontribuado por Starto kaj helpado al la redaktoro.

**La kongreso prenas en konsideron** komitatan raporton pri la antaŭkongreso en Svitavy (19.-23.7.2016) kaj raporton pri agado de organizaj unuoj de ĈEA.

*En Pelhřimov la 16-an de oktobro 2016*

# Bilanco de aktivecoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la periodo 2011-2016

Kio (mal)sukcesis aŭ (mal)prosperis
ev. menciindas sub tegmento de ĈEA kaj ekzemploj pri tio

*Prezento de la ĈEA-prezidanto Vladimír Dvořák*
*aprobita far partoprenantoj de la jarkunveno*
*okazinta 15.10.2016 kadre de la 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov*

**PROSPERO:**

**+ financa prosperado**
(ĉiujare kreskanta financa pluso, kiu senteble altigis havaĵon de ĈEA)

**+ funkcianta Esperanto-muzeo en Svitavy**
(regulaj ekspozicioj kun inaŭguroj kaj akompanaj programoj, prelegoj, kunlaboro kun la loka klubo, katalogigado de dokumentoj, subskribita kontrakto kun la urbo Svitavy pri trijara daŭrigo de senpaga luo de la muzea ejo)

**+ sukcesaj internaciaj aranĝoj**
(Vikimanio en Svitavy, Trilanda Konferenco en Břeclav, Antaŭkongresa Ekskurso de UEA en Svitavy)

**+ jura stabiliĝo**
(akcepto de la nova statuto kaj de aliaj dokumentoj ekde balotregularo ĝis kontraktoj kun memstaraj kluboj)

**+ pli abundaj donacoj kaj subvencioj**
(de membroj kaj nemembroj de ĈEA, juraj personoj, ŝtataj institucioj kaj Esperanto-fondaĵoj)

**+ informa aktiveco kaj ekstera videbliĝo**
(tutŝtata migra ekspozicio en 37 institucioj, ekspozicioj kaj prelegoj en Esperanto-muzeo kaj pluaj lokaj ekspozicioj, virtualaj kolektoj en Ipernity, kelkdek artikoloj kaj intervjuoj en amaskomunikiloj, aprezo de la Fondaĵo Cigno pri modela publika inform agado en la j. 2012 k.a.)

**+ uzado de modernaj teknologioj**
(asocia kaj muzea retpaĝaroj, Facebook, retpoŝta komunikado kun membroj, ampleksa ciferecigado de dokumentoj, son- kaj filmregistraĵoj, seminarioj kaj artikoloj pri komputila klerigado)

**+ stabila komitato**
(pli malpli dum la tuta periodo 6 samaj membroj, reguleco de kunvenoj, detalaj kunvenprotokoloj)

**+ ligo de konstanta (la urbo Svitavy) aŭ porokaza kunlaboro kun enlandaj neesperantaj subjektoj**

(bibliotekoj kaj muzeoj kadre de la migra ekspozicio, Vikimedio ĈR, Memormuzeo pri Karel Čapek, televido CMS - filmodublado, skolta organizo Vanaivan Kopřivnice - Esperanto-monumento, DOMA kaj aliaj artensembloj el Bohemia-Moravia Landlimo, gimnazio Přírodní škola - retpaĝaro VEDEM, Bahaa komunumo k.a.)

**KONSTANTA STATO:**
**= membra stagnado**
(modera ĉiujara malkresko de nombro kaj kresko de aĝo, malgranda nombro de novaj membroj, sed partopreno en aranĝoj kaj klerigaj kursoj)
**= kunlaboro kun aliaj enlandaj esperantistaj subjektoj**
(KAVA-PECH - OSIEK 2012, lernolibro kaj granda vortaro; AEH – plurjara financa subteno de kursoj en Skokovy; Verda Stacio – diskonigo de IEL en Bartošovice)
**= plejparte nur individua aktivado**
(troa dependeco de individuoj kaj iliaj eblecoj; esceptoj - ekzemploj de komuna laboroboro estas ekz. pretigo de la lernolibro "Esperanto od A do Z" kaj de pluraj libroj, Legolibreto, Muzea kaj ekspozicia grupo, nove konceptita Praga Bulteno)
**= kontribuado de membroj al asociaj projektoj (malgraŭ sufiĉa klerigado)**
(Vikipedio, tradukoj de turismaj tekstoj, sonregistraĵoj, Memoro de la movado - en la projektoj partoprenas nur kelkaj ĉiam la samaj individuoj)
**= lingvoinstruado**
(nesufiĉa varbado, malgranda reeĥo pri kurso por komencantoj, sed okazantaj kursoj por membroj kadre de la aranĝoj aŭ ilia subteno)

**NEPROSPERO:**
**- sistema internacia engaĝiĝo en aktivadoj de UEA kaj EEU**
(malmultaj interesitoj kaj aktivecoj, inkl. ĈEA-prezidanton)
**- internacia kunlaboro kun aliaj E-asocioj kaj ĈEA-fermiteco**
(mankas sistemeco kaj gvidanto, sed ankaŭ partneroj duaflanke, plejparte nur porokazaj iniciatoj inkl. helpon de membroj dum UK 2016, ne okazas reciprokaj invitoj al kongresoj, Trilanda Konferenco sen realigo de lanĉitaj iniciatoj; pozitivaj esceptoj: Antaŭkongresa Ekskurso de UEA, interŝanĝo de libroj kun ekskterlandaj muzeoj kaj bibliotekoj, kontaktoj kun Silezia Esperanto-Asocio)
**- nesufiĉa kaj nur individua informado flanke de la membroj por Starto kaj asocia retejo**
(informoj pri aranĝoj, publikigitaj artikoloj aŭ aprezitaj aktivecoj, fotoprezentoj)
**- malforta eldona agado**
(necesa adapto al la cifereca epoko, malalta intereso de legantoj kune kun malgranda merkatejo kaj ekonomiaj riskoj, sed certagranda rekompenso en formo de senpagaj ciferecaj dokumentoj en interreto kaj eldono de la KDo de la Sekcio de nevidantoj)

* * *

# RAPORTO PRI AGADO DE ĈEA

**ekde la anstataŭa 15-a Kongreso**
**ekde novembro 2015 ĝis oktobro 2016**

La unua parto sekvas ĉi-sube:
1. Plenumado de la prioritatoj el la kongreso 2014 (komitato)
2. Agado de la komitato (V. Dvořák)
3. Ĝenerala raporto pri ĈEA-aktiveco (P. Dvořáková + komitato)
4. Raporto de UEA-delegito por ĈEA (P. Chrdle)

La dua parto aperos en Starto 2017/1:
5. Stato de la membraro (V. Hirš)
6. Raporto pri mastrumado (V. Hirš )
7. Raporto pri aktiveco de organizaj unuoj de ĈEA (P. Dvořáková)

*Ĉiuj ĈEA-membroj ricevantaj elektronikforman Starton ricevos retpoŝte samtempe ligilon al la kompleta Powerpoint-prezento el la kongreso en Pelhřimov.*

## 1. RAPORTO PRI PLENUMADO DE PRIORITATOJ
**akceptitaj dum la 14-a ĈEA-Kongreso en Prostějov (2014)**

### Prioritato 1a) - Esperanto-Muzeo en Svitavy

La funkciado okazis sub la ĝisnunaj juraj kondiĉoj (la muzeo estas organiza unuo de ĈEA sen propra jura memstareco kaj senpage uzas teretaĝan spacon de la Ottendorfer-domo, posedatan de la urbo kaj administratan de Urba Muzeo kaj Galerio). **La funkciado estas prizorgata plene volontule kaj senpage helpe de membroj de ĈEA, ĉu loĝantaj en aŭ ekster Svitavy** (pluraj membras en la Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA). La teamanoj estas Pavla Dvořáková (ekspozicioj inaŭguraj programoj, muzeaj retejoj kaj virtualaj kolektoj, artikoloj, subvenciaj programoj), Marie Čumová (biblioteko, arkivo, Libroservo), Miroslav Malovec (literaturo kaj historio, ciferecigo de libroj kaj arkivaĵoj, tradukoj), Petr Chrdle (internaciaj kontaktoj, librointerŝanĝoj, informado) + porokaze pluaj membroj kaj komitatanoj. La funkciadon de la muzeo kaj organizan bazon por lokaj aranĝoj kaj zorgon pri gastoj prizorgas membroj de la loka klubo (KPE – M. Nárožný, J. Bobrík, P. Jonáš, M. Minářová, D. Martinková, k.a.). La klubo uzas la ejon ankaŭ por propraj aktivaĵoj (inkl. senpagajn lingvokursojn de M. Minářová) kaj por prelegoj de Asocio Brontosaurus. M. Nárožný helpas ankaŭ pri arkivo kaj informa laboro. Estrino de la muzea grupo kaj de la klubo estas Libuše Dvořáková (krom kunordigo kaj kontaktoj kun la urbo estas plenjare ŝarĝita per prizorgo de ĉio necesa). Ekde 26.9.2015 en la muzeo troviĝas tema ekspozicio *"Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo"* kun ekspoziciaĵoj de pluraj ĈEA-membroj. En 2016 pro okupiteco per Antaŭkongreso escepte ne estis preparita nova ekspozicio. - En 2016 aperis **novaj materialoj**: kunlabore kun KPE la

urbo Svitavy proprakoste eldonis esperantlingvan prospekton *"Urba monumenta rondpromeno"* (tradukis M. Malovec); P. Dvořáková pretigis kompleksan prezenton de ĈEA kaj de la muzeo por vizitantoj (en Powerpoint) kaj preparis pli detalajn ĉiĉeronajn tekstojn pri la urbo. - **Teknika ekipo**: la stato ne estas plene kontentiga, tamen plejparte (krom la komputilo por uzantoj) funkcikapabla. M. Nárožný prizorgis novan monitoron por la muzea komputilo. Oni esploris ofertoeblecojn por novaj komputilaj kaj specialaj foliumeblaj paneloj. - **Aranĝoj organizitaj far la loka klubo**: Regiona renkontiĝo kaj Muzea nokto por la publiko (20.-21.5), regulaj vojaĝprelegoj de Asocio Brontosaurus (ekz. Geokaŝado, Norvegio, Fajrolando k.a.); el porokazaj aranĝoj por la publiko grandan reeĥon havis psikologia prelego de d-ro Max Kašparů (22.9.). Tradicie la plej vizitata estis La 8-a Marcipana Kristnasko (13.12. - ateliero por infanoj kaj la gepatroj, gvidata de geedzoj Vyšinka - ĉ. 1000 dum unu tago). - Pluso de la jaro estis **pli oftaj vizitoj el eksterlando** (ekz. Germanio, Francio, Luksemburgio, Japanio, Ĉinio k.a.) . La plej grava internacia vizito el 4 kontinentoj okazis kadre de la kvartaga **Antaŭkongresa Ekskurso** de UEA 20.7.2016, kun ĉeesto de la regiona radio (vidu apartan artikolon en Starto 2016/3). Surbaze de kunlaboro inter ĈEA kaj SEA (Silezia Esperanto-Asocio) en septembro venis tuta buso da gastoj el Pollando.
**Biblioteko, arkivo kaj libroservo** (M. Čumová): Informoj kaj aktualaj katalogoj troviĝas en muzeum.esperanto.cz. Estas registritaj pli ol 17 000 bibliotekaj unuoj (libroj kaj jarkolektoj de gazetoj) - dum la pasinta jaro pli ol 1000 novaj unuoj. En oktobro 2016 ĈEA sukcesis denove akiri subvencion Bachrich de 159 eŭroj por elektitaj libroj (ĉi-foje kontraŭ kovro de poŝtelspezoj). Estis akceptitaj librodonacoj de ĈEA-membroj (J. Rýznarová, P. Polnický, M. Smyčka, M. Severa). Librointerŝanĝoj kun la ĝisnunaj partneroj en 2016 ne okazis, sed estis ligitaj pli proksimaj rilatoj kun la Esperanto-Muzeo en Ĉinio (kaj estis senditaj la unuaj 4 libroj). Stato de alirebligo de la biblioteko estos raportita en la prioritato 1d. Deponejo nun estas nur unu (spaco en la Ottendorfer-domo estis liberigita) - ĉ. 10 minutojn piede de la muzeo. Plu daŭras postulhava prilaboro. Malgraŭ granda spaco jam komenciĝas problemo pri troa plenigiteco. Necesis komenci elekti kaj forigi almenaŭ difektitajn ekzemplerojn (el multoblaĵoj). M. Nárožný certigis komputilon kaj ekranon kaj L. Dvořáková donacis skribotablon. - **Libroservo:** Intereso pri libroj daŭre malaltas, en 2016 ne okazis aĉeto de novaj titoloj (krom akcepto de KDo *Kun kanto ĉirkaŭ la mondo*). Okazis rabatoj por elektitaj librotitoloj, kiu en Ústí n. O. havis bonan reeĥon. Pluraj libroj plu disponeblas senpage por bezono de kluboj. - **Virtualaj kolektoj** (P. Dvořáková): infopanelo kaj dosieroj en la muzea komputilo - en 2016 en stato senŝanĝa, stato de la komputilo malbonas kaj necesos havigi la novan. Virtualaj kolektoj en interreto: muzeum.esperanto.cz: ekde 2015/11 8 novaj artikoloj kaj 5 novaj fotogalerioj inkl. ampleksan agadraporton por la urbestraro. Estis kompletigitaj kaj aktualigitaj pluraj rubrikoj. En septembro 2016 M. Hruška komencis pretigi pli modernan version de la retejo en Wordpress. Nuntempe en labora versio, necesas kompleksa solvo. Kompetenta kunlaboranto (ankaŭ por solvo de la centra deponejo) serĉatas! - Muzea paĝo ĉe Ipernity: en 2015/11 42 fotoalbumoj kun 1515 dosieroj, en 2016/10 50 foto-

albumoj kun ĉ. 1870 dosieroj - do ĉ. 355 novaj multmediaj dosieroj. Nombro de membroj en la reto (2300 el 95 landoj, ankaŭ neesperantistoj) estis stabila, ĉ. 20 novaj. Virtualaj vizitoj (ekde 5.1.2011 ĝis 11.10.2016 ) ĉ. 116 000, dum unu jaro ĉ. 16 000. Kreskas nombro de vizitantoj-nemembroj (pere de Guglo-danke al detala priskribo de la dosieroj). Tutjare la muzeo estis diskonigata en Facebook (muzea paĝo, grupo de Amikoj de Muzeo de Esperanto, ĝeneralaj esp. grupoj), en esperanto.cz, gazetartikoloj. Bezonatas kunlaboro de pliaj membroj! La paĝo ĉe Facebook en 2016 plivigliĝis, aperis novaj favorantoj, precipe el eksterlando. - Sukceso estis aperigo de la **artikolo** de M. Malovec pri Esperantaj bibliotekoj en la prestiĝa moravia bibliotekista gazeto DUHA (2016/3). - Ekde septembro 2016 okazas **sistema kleriĝado**: P. Dvořáková partoprenas en 3 senpagaj interretaj bibliotekistaj kursoj kaj D. Martinková partoprenas tutjaran kurson pri muzea pedagogio en Brno. En la muzea retejo estis kreita aparta paĝo por ligiloj al bazaj informfontoj pri biblioteka kaj muzea sciencoj.

## Prioritato 1b) - Laŭebla teno de ekvilibra budĝeto

La stato daŭre pliboniĝas precipe dank' al kondiĉa aliro de la dumvivaj membroj al presita Starto, malpli ofta nombro de komitatkunsidoj, gravaj donacoj de membroj en 2016 (pli ol 50.000,- CZK) kaj celitaj donacoj kaj subvencioj por la kongreso en Pelhřimov kaj por ĈEA-agado 38.000,- CZK), senpaga luo de la muzeo kaj de la deponejo, senpaga librotenado. Tamen je donacoj ne eblas sin apogi kaj ili ne kreas stabilan bazon. Alto de la membrokotizoj longdaŭre stagnas kaj eĉ ne havas taŭgan strukturon. Oni ne sukcesas pli aktivigi la membraron kaj akiradi novajn aktivajn membrojn aŭ pluajn financajn rimedojn de ekstere. Ŝlosilaj datumoj: ekvilibra resto el la lasta kongreso, elspezoj por la muzeo pli ol 20.000,- CZK, stagnantaj enspezoj de Libroservo (nuraj malpli ol 7.000,- CZK), enspezo (ne profito!) 200.000,- CZK dum perado de servoj de UEA, grava financa resto el la Antaŭkongresa Ekskurso de UEA en Svitavy. Pluso el la finita dungiteco de J. Pospíšil (ciferecigitaj materialoj, aĉeto de teknika ekipaĵo kaj programaro, donacoj). Estis travidebligita budĝeto kaj stato de havaĵo de ĈEA (restas nur finkalkuli valoron de varo en Libroservo).

## Prioritato 1c) - Projektoj *Ciferecigado* kaj *Fonoteko*

Prilaboro de dokumentoj al komputila formo havas motivojn de protekto de la dokumento, pli komforta alirebligo, ŝparo de spaco k.a. kaj okazas ĉu per transskribado, ĉu per skanado aŭ fotado kaj sekva optika signorekono, transformanta bildon al teksto. En ĈEA ĝi havas longan tradicion, M. Malovec komencis pri ĝi jam antaŭ 20 jaroj.- **La laborgrupo pri ciferecigado** laboris en 2016 en sekva konsisto: estro kaj ĉefa laboranto M. Malovec, V. Türk (skanado, ABBYY, son- kaj video-registraĵoj, korektoj), J. Pospíšil (la samo - kiel dungito - ĝis 30.4.), P. Dvořáková (skanado de fotaĵoj, sonregistraĵoj, alirebligado, virtualaj kolektoj de la muzeo, prilaboro de elektronikaj libroj por la projekto NP, studado de fakaj standardoj), J. Malá, A. Hasala, J. Dubinová kaj J. Košťálek (transskribado de tekstoj) kaj K. Votoček (lingva kontrolo). - M. Malovec nove ciferecigis ekz. verkojn de Hašek, Neruda, Prus,

Š. Urban k. a., V. Türk ekz. skanis pli ol 10 kg da arkivaĵoj el la Domo de T. Kilian en Třebíč kaj pretigis dulingvan spegulan version de la Propra biografio de Karolo la Kvara kun koloraj fotaĵoj. La dungito J. Pospíšil laŭ postulataj standardoj prilaboris dum unu jaro kelkdek librojn, grandan politeknikan vortaron k. a. Antaŭ ev. alirebligo nun estas postulhava etapo de sistemigo (realigas M. Malovec). Estas ankaŭ solvata problemo de optimuma deponejo kaj konservado de sekureckopioj. M. Malovec prizorgas ĉ. 63-paĝan datumbazon de ciferecigitaj tekstoj kun indikoj pri deveno, kontrolo, jura statuso k. a. - ĝi entenas ne nur kompletajn librojn sed ankaŭ partajn tekstojn el manuskriptoj k. a. Okazas i. a. preparo de *Avineto* kun ilustraĵoj de A Kašpar kaj *Malnovaj mitoj ĉeĥaj* kun ilustraĵoj de V. Černý. Aperis jam pilota projekteto - fabelo pri *Orharulino* kun ilustraĵoj de A. Scheiner. - **Projekto *Fonoteko:*** en 2016 okazis certgrada stagnado pro troŝarĝiĝo per aliaj taskoj kaj manko de laborantoj. Pro malalta reeĥo ĉi-jare seminario pri sonregistraĵoj en Skokovy ne okazis. Sed estis alirebligita instrukcia video en la retejo kaj estis pretigita seminario por membroj dum la kongreso en Pelhřimov (kunlabore kun A. Oberndorfer). P. Dvořáková alirebligis diversajn sonregistraĵojn en la muzea paĝo en Ipernity (i. a. de la Sekcio de nevidantoj - kantoj el Kdo, Ŝvejk, Bruncvík, Ĉinaj rakontoj). Realiĝis novaj kantregistraĵoj de M. Smyčka. Antaŭ ĈEA-Kongreso V. Türk tradukis kaj dublis filmon pri Pelhřimov. Kune kun J. Malá li ankaŭ komencis realigi registradon de *Malnovaj grekaj mitoj*.

**Prioritato 1d) - Alirebligo de la ĈEA-biblioteko kaj de la ciferecigitaj dokumentoj al ĈEA-membroj kaj al la publiko**

1) Biblioteko - La **katalogo** disponeblas en la muzea retejo. Oficiale la **pruntoj** eblas nur en la muzea ejo, sed neoficiale al aktivaj ĈEA-membroj por gravaj celoj (laŭ antaŭa permeso de L. Dvořáková) ev. eblas ankaŭ pruntoj hejmen. En 2016 okazis pruntoj ankaŭ por eksteraj organizoj (ekz. la Urba Muzeo en Litomyšl). Oni ne pruntas eksteren rarajn titolojn kaj dokumentojn posedatajn nur en 1 ekzemplero. P. Dvořáková en 2016 kleriĝis pri biblioteka leĝaro. En la fina etapo estas prilaboro de la labora versio de la **pruntoregularo**, kiu ekfunkciu esperable en majo/junio 2017. La problemo estas, ke **la biblioteko estas tre specifa hibrido**: ĝi estas parto de la muzeo, sed apartenanta al tutŝtata societo, nur kun specialaj kolektoj kaj ne havanta juran memstarecon. Ĝi havas volontulan karakteron kaj ĉi-momente ne kapablas plene garantii postulatajn standardojn por publikaj bibliotekaj servoj. Sen tio ne eblas nuntempe ekz. peti pri subvencioj flanke de la ministerio. Tamen la problemo estas konsultata kaj solvota.

2) Ciferecigitaj dokumentoj (lige kun la prioritato 1c)

Daŭra **literatura rubriko** en esperanto.cz ne estis en 2016 kompletigata pro aliaj taskoj en ciferecigado. - En majo 2016 okazis alirebligo de far M. Malovec esperantigita interreta versio de la gazeto **VEDEM - gazeto** de judaj infanoj, aperinta en Terezín en 1942-1944. - **Ekzemploj de nove alirebligitaj dokumentoj** en 2016: *„La granda admiralo"* de F. Omelka en la datumbazo Gutenberg, novaj prelegoj en la retejo de EK Brno , pli ol 50 elektronikaj libroj en la muzea retejo en Ipernity (Shake-

speare, porinfana literaturo, antiutopioj, Ŝvejk k. a.). - La plej grava preparata projekto celas **prilabori kaj akceptigi elektitajn ciferecigitajn Esperanto-librojn al interretaj publike alireblaj ciferecaj kolektoj de la Nacia Biblioteko de ĈR kaj de la Urba Biblioteko en Prago** (eblas ankaŭ nove krei proprajn elektronikajn librojn kun ilustraĵoj, eblas fizike en la biblioteko mem aliri eĉ dokumentojn protektatajn nun de la aŭtora leĝo). Temas pri afero prestiĝa, sed por realigo ankaŭ sufiĉe postulhava. Necesas konservi komplikajn standardojn de prilaboroj teknika kaj bibliotekista, pri kio oni kleriĝas. - Pluraj libroj jam finpreparatas por la unua etapo de akceptigo. - Pli rapidan alirebligon malhelpas precipe aŭtora leĝo kaj organizaj kaj teknikaj problemoj (datumbazo, deponejo por datumoj k. a. Ĉiukaze ĈEA plu daŭrigos la projekton, eĉ se ĝi ne plu estus inter oficialaj prioritatoj. Pluaj kompetentaj kunlaborantoj nepre bezonatas!

## 2. AKTIVECO DE LA KOMITATO

Plu daŭris regulaj printempaj kaj aŭtunaj kunvenoj en Svitavy kun detalaj protokoloj kaj konsekvenca retpoŝta kaj skajpa korespondado. La komitato ne estis kompletigita kaj plu laboris en sesmembra konsisto (V. Dvořák-prezidanto, L. Dvořáková-vicprezidanto, V. Hirš-kasisto, P. Dvořáková, M. Malovec kaj M. Hruška - membroj), do ne ĉion oni sukcesis realigi aŭ fini kaj kelkaj agadsferoj ne estis evoluigataj. La komitato laboris en konkordo, sed en sia libera tempo, libervole kaj senpage, do kun diversa intenseco de laboro kaj amplekso de la dediĉita tempo. Ĝis 30. 4. 2016 la komitato estris laboron de la unusola dungito J. Pospíšil (vidu la prioritaton 1d). La projekto estis sukcese finita (inkl. realigitan kontrolon). Duono de la komitato kandidatiĝas por la samaj funkcioj (V. Hirš, M. Malovec kaj M. Hruška) kaj L. Dvořáková kun parta ŝanĝo, do la kontinueco de la laboro povas esti certigita. La komitato transdonas la organizon sekurigitan jure kaj ekonomie (inkluzive daŭrigon de la senpaga lupreno en Svitavy por pluaj 3 jaroj).

## 3. ĜENERALA RAPORTO

### 3. 1. Informa agado

3. 1. 1. **Amaskomunikiloj:** Realiĝis 8 elsendoj pri Esperanto en radio kaj 1 elsendo en regiona televido (en 2015 - por komparo - estis 4+4). La ligiloj troveblas en http://www. esperanto. cz en la rubriko *O esperantu*. Okazon videbligi Esperanton lige kun UK en Nitra modele uzis M. Zemanová, kiu aperigis du artikolojn kaj realigis unu radiointervjuon. Kompare kun la antaŭa jaro la artikoloj estis malpli ofte en regionaj ĵurnaloj (tamen aperis ekz. en *Naše město* Svitavy, *Brněnský deník, Orlický deník, Písecký deník, Jiskra Benešov* k. a. ), sed multiĝis ĉi-foje artikoloj en gazetoj fakaj (bibliotekista: revuo *Duha* - grava artikolo de M. Malovec pri esperantaj bibliotekoj, fervojista: *Obzor*, literatura: *Bulletin Společnosti bří Čapků*, kolektanta: *Filatelia*) kaj precipe prestiĝaj (*Mensa*, *Epoch Times*).

3. 1. 2. **Ekspozicioj:** Migra ekspozicio *"Ĉu Esperanto estas morta lingvo?"* de P. Dvořáková en 2016 pro sanaj kaj organizaj kialoj paŭzis kaj planatas esti finita en

2017. Informan funkcion por publiko plenumas ankaŭ la nuna tema kaj daŭra ekspozicioj en Esperanto-Muzeo.
3. 1. 3. **ĈEA-Informiloj:** Kvaronjara *Starto* (ĉefredaktas M. Malovec) aperis regule. En 2016 estis same kiel en 2015 distribuataj ĉ. 300 presitaj ekzempleroj (el tio 17 eksterlanden - inkl. Japanion kaj Usonon). Multaj membroj ricevas ĝin elektronikforme; plu estas prizorgata adaptita html-formo por nevidantoj. Daŭras problemo de nesufiĉaj kontribuantoj, ne ĉiam venas informoj pri okazintaj aŭ okazontaj aranĝoj aŭ aliaj aktivecoj (aperintaj artikoloj ktp.) fotaĵoj k. a. Plia iniciatemo flanke de la organizantoj kaj de la klubo bezonatas! Jam lanĉita ideo pri nova "mantelo" (strukturo, aspekto, enhavo) ne evoluis plu kaj restas defio por la nova estraro. En la ĈEA-retejo www. esperanto. cz (ĉefredaktis P. Dvořáková, kun redaktoroj M. Hruška kaj M. Malovec) estis konstanta nombro de novaj artikoloj (ĉ. 3 monate: 23 en la ĉeĥa kaj 13 en Esperanto - kompare kun retejoj de aliaj landaj asocioj superstandarda nombro). Okazis partaj necesaj aktualigoj, sed por kreo de kompleksa pli moderna retejo dume mankas fortoj kaj fakaj scioj. Dume haveblas nur unu nedevontiga promeso pri projekto de la nova retejo en la redaktosistemo Drupal. Kompare kun 2015 okazis pli ofta partumado de la artikoloj en Facebook. La retejon vizitadis averaĝe 1930 vizitantoj monate (= je 10% malpli ol en 2015). 87% estas el Ĉeĥio, 66% estas novaj vizitantoj kaj 34% revenas - ĉiumonate do venas 1100 novaj vizitoj el Ĉeĥio, kaj ĉ. 250 vizitoj el eksterlando (inkl. ripetajn). Plej oftas Slovakio, Hispanio, Germanio, Aŭstrio, Francio, Nederlando; unuopuloj el ekstereŭropaj landoj. Preskaŭ 70% vizitantoj venas surbaze de elserĉado en serĉilo, ne laŭ la konkreta adreso. Aperigo de artikoloj ne pure rilataj al Esperanto (ekz. pri vojaĝado, lingvoj ĝenerale, komputila klerigado) helpas al venigo de novaj gastoj. **Retkomunikoj** en 2016 ne aperis (pro ripete malalta reeĥo, malgraŭ pliboniĝinta enhavo kaj aspekto). Nova koncepto por iom aliaj celgrupoj dume ne konkretiĝis. Informo pri la muzea retejo (www. muzeum. esperanto. cz) aperis en la parto pri Plenumado de prioritato n-ro 3. 1. 4. **Klubaj informiloj:** Praga Bulteno, informtabuloj, klubaj retejoj, Ipernity, Facebook, Youtube - vidu apartan Raporton pri agado de organizaj unuoj de ĈEA.
3. 1. 5. **Ceteraĵoj:** Publikaj prelegoj ĉi-foje estis anoncitaj nur escepte.
Plano pri kunordigo de aktivecoj por la Zamenhof-Jaro 2017 stagnis, kvankam kelkaj laboroj jam faritas (kolekto de aperigotaj bildmaterialoj, de ĉeĥaj tradukoj de Zamenhof-verkoj, listo de dezirindaj tradukoj inkl. fontojn ktp.), sed necesas la laborojn rapidigi.
Resume la rezultoj en tiu ĉi agadkampo estas relative kontentigaj. Tamen pliaj kunlaborantoj daŭre serĉatas.

## 3. 2. LINGVO - lernado, instruado, tradukoj, eldona agado, kulturo

**3. 2. 1. Pedagogia komisiono** funkcias plu en konsisto J. Melichárková kaj M. Malovec, kiu prizorgas la retejon www. literatura. bucek. name/ilei/ilei. html, entenanta riĉajn referencajn informojn. La stato estas konstanta, en 2016 ne okazis

grava aktualigo. Enestas i. a. instruplano kaj standardoj por ev. instruado de Esperanto kiel la dua fremda lingvo en elementaj lernejoj (prilaboritaj laŭ postuloj de la ministerio). Nombro de ILEI-membroj kaj interagado kun ILEI ne estas tro kontentigaj. Organize kapabla volontulo por sistema kunordigo de la ĈEA-aktivecoj en la sfero de instruado bezonatas kaj plu serĉatas.

**3. 2. 2. Instruado en kursoj kaj aranĝoj**

Daŭre okazas lingva instruado, ev. kursoj en kelkaj kluboj (anoncite el Mladá Boleslav, Svitavy, Olomouc, Brno, Č. Třebová, Ústí nad Labem, Šumperk, Benešov, Pelhřimov kaj Hranice). - Pri korespondaj kursoj (gvidas M. Tomečková) estas bedaŭrinde nesufiĉa intereso (supozeble ankaŭ pro konkurenco de interretaj kursoj), ĈEA ne sukcesis pri pli efika reklamo. Estis modernigita aliĝilo kaj pli videbligita diskonigo de la kurso kadre de la ĈEA-retejo. - Nombro de lernantoj en Lernu. net ne estis en 2016 esplorita, Esperanto-kurso en la tendaro Lančov ne okazis. Aranĝoj entenantaj Esperanto-lecionojn, organizataj ekster ĈEA, kiujn antaŭe abunde partoprenis ĈEA-membroj (SES Nitra kaj IEL Bartošovice) ĉi-jare ne okazis. - Tamen denove sukcese trapasis printempa kaj aŭtuna lingvaj seminarioj en Skokovy (J. Drahotová-organizas AEH kunlabore kun EK Mladá Boleslav), kun ripeta partopreno de pluraj novaj ĈEA-membrinoj. Pozitiva informo estas, ke infana rondeto kadre de la skolta grupo en Prostějov (gvidas J. Liška), fondita en 2014, plu funkcias. P. Chrdle instruis Esperanton por duonprogresintoj en la porseniora kleriga centro en Prago 8. - Klubo E-mental' (kun plejparto de membroj ankaŭ en ĈEA kaj en EK Prago) organizis en majo semajnfinan instruan-ripozan aranĝon SELE kun M. Tomečková en Chocerady. - Instruado eksterlande: en marto 2016 J. Drahotová kaj J. Malá instruis en konversacia kurso kadre de la aranĝo *Mediteranea Esperanto-Semajno* en Les Issambres en suda Francio.

**3. 2. 3. Instru- kaj lingvomaterialoj**

- Kiel evento de la jaro, en februaro 2016 okazis en Prago inaŭguro de la lernolibro *"Esperanto od A do Z pro samouky i kurzy"* ( KAVA-PECH) kun interretaj ekzercaro kaj ligilaro. Temas pri sifnige reprilaborita 4-a eldono de *"Esperantem za 3 měsíce"* de P. Chrdle kaj S. Chrdlová. Ĝi estis ekzemplo de modela kulaboro - en la finpretigo kunlaboris pliaj ĈEA-membroj (precipe K. Votoček, J. Vojáček, Z. Pluhař, J. Melichárková, M. Turková, J. Košťálek, P. Miňovský; sonregistraĵoj V. Türk, J. Malá kaj P. Dvořáková).
- Aperis du novaj "*Legolibretoj*" (ĉefredaktas kaj eldonas J. Drahotová), kun partopreno de pluaj kontribuantoj el kaj ekster ĈEA, taŭgaj kaj por memstudado, kaj por instruado kaj klubaj programoj.
- J. Hron daŭrigas siajn laborojn en la vortaro en www. slovnik. cz kaj www. esperanto. wz. cz . Nuntempe i. a. enmetas terminojn el la *„Bildvortaro“* - kunlaborantoj por tiu ĉi ampleksa laboro necesas! En fina etapo antaŭ eldono estas Granda vortaro esperanta-ĉeĥa de M. Malovec (eldonos supozeble en februaro 2017 KAVA-PECH). Per lingva kontrolo kunlaboris precipe Z. Pluhař kaj K. Votoček.
- Lingva rubriko en la ĈEA-retejo kaj en Starto en 2016 ne okazis pro manko de kontribuemuloj.

**3. 2. 4. Cetera eldona agado**

- Konforme al la nunaj tendencoj, ĈEA numtempe pli koncentriĝas pri ciferecigado kaj preparo de eldono de elektronikaj libroj. Negativa faktoro por klasika eldonado estas malgranda nombro kaj intereso de legantoj kaj ekonomiaj riskoj.
- En julio 2016 ĈEA sub redaktorado de P. Dvořáková aperigis kompaktdiskon *"Kun kanto ĉirkaŭ la mondo"* kun 17 kantoj registritaj de la membroj de la Sekcio de nevidantoj, geedzoj Jelínek kaj Karaš.
- Eldonado da paperaj libroj kaj periodaĵoj (krom Starto) okazis ĉefe kadre de kluboj aŭ flanke de memstaraj subjektoj. Ekz. en februaro 2016 KAVA-PECH eldonis libron *"Robinsoni na Sibiři"* de Tivadar Soros, tradukita el Esperanto al la ĉeĥa far J. Drahotová. Ilustraĵojn kreis M. Tomečková. "*Legolibretoj"* de J. Drahotová estis jam menciitaj en la alineo 2. 3. En junio 2016 KE Brno aperigis aŭtoran fotolibron de O. A. Fischer *"Kun fotilo inter libeloj"*. Finpreparitas kaj baldaŭ en KAVA-PECH eldonotas libro pri Francisko V. Lorenz (poligloto kaj verkinto de la 1-a Esperanto-lernolibro por ĉeĥoj), verkita de prof. V. Novobilský, prezidanto de EK Ústí n. L.

**3. 3. INTERNACIA KUNLABORO**

**3. 3. 1. Ĝenerala situacio**

La prioritatoj de la ĈEA-estraro koncentriĝis precipe pri necesa financa kaj jura restabiligo, informado, muzea projekto kaj ciferecigado. Sistema internacia kunlaboro bedaŭrinde stagnis (ĉu kun UEA, EEU aŭ landaj asocioj).

Tamen en aprilo 2016 P. Dvořáková nome de la estraro pretigis kaj dissendis paskogratulojn kaj koncizajn informojn kaj ligilojn pri la nunaj aktivecoj de ĈEA kune kun instigo al reciproka informinterŝanĝo kaj ev. kunlaboro pri konkretaj projektoj al multaj, precipe eŭropaj, landaj Esperanto-asocioj. Necesas konstati kun bedaŭro, ke la iniciato havis nur minimuman reeĥon.

**3. 3. 2. Kontribuo de ĈEA al la 101-a UKo en Nitra**

Tiun ĉi eventon de la jaro partoprenis 77 partoprenantoj el Ĉeĥio (plej multe el la ĝisnunaj UKoj lastjaraj). Kunlabore kun SKEF ĈEA klopodis diversmaniere diskonigi informojn pri UKo kaj subteni ĝin. Pozitivas kaj aprezindas, ke multaj ĈEA-membroj ankaŭ aktive subtenis la kongreson kiel helpantoj, la gejunuloj ankaŭ kadre de la specifa EU-projekto. ĈEA pretigis apartan standon kaj diskonigis siajn aktivecojn kadre de la Movada Foiro. Por tiu celo estis prilaborita aktualigita 4paĝa flugfolio pri ĈEA kun bazaj informoj, kontaktoj kaj ligiloj. Notinda estas kontribuo al la teatra programo: M. Malovec esperantigis (laŭ la traduko de J. Vondroušek) koncizigitan scenaron por la teatraĵo *"El la vivo de insektoj"* de fratoj Čapek, kiun surscenigis la studenta ensemblo DOMA el Svitavy; V. Pištíková, J. Šebetovský kaj V. Mišurec tradukis kaj prezentis ŝercan teatraĵon *"Konkero de la norda poluso"*. La personaj internaciaj kontaktoj de la membroj estis sendube grava motiviga faktoro por ilia ev. aktiveco por la movado.

Sistema kolektado, elekto, prilaboro kaj alirebligo de interesaj foto- kaj videodosieroj far ĈEA-partoprenintoj bedaŭrinde ne okazis pro manko de kunordiganta persono. En

la muzea retejo kaj en Ipernity tamen estis publikigitaj du albumoj (kvankam plejgrandparte el interretaj fontoj).

**3. 3. 3. La ĉefa internacia aranĝo de ĈEA en 2016 - Oficiala Antaŭkongreso de UEA en Svitavy**

Aranĝo destinita por UK-partoprenantoj okazis 19. -23. 7. 2016. Prizorgis ĝin ĈEA-estraro (V. Dvořák, P. Dvořáková, L. Dvořáková) kunlabore kun UEA kaj la loka klubo. Laŭkvante malpli granda ol planite (sed proporcie same kiel en UKo mem) - venis nur dudeko da partoprenantoj, sed el 4 kontinentoj (krom eŭropaj landoj - Ĉeĥio, Germanio, Francio, Hispanio - ankaŭ el Brazilo, Usono, Suda Koreio, Japanio kaj Aŭstralio). La ĉeestantoj estis oficiale solente akceptitaj en la urbodomo (kune kun tiutage koincide ĉeestanta 16membra grupo el Ĉinio, vojaĝanta trans Nový Jičín al Nitra). - Krom la programo en Svitavy okazis ankaŭ ekskursoj al Litomyšl kaj Olomouc, ambaŭfoje en modela kunlaboro kun membroj la lokaj kluboj. Ekskursoj estis akompanataj per riĉa kultura programo prizorgita de la lokaj artensembloj. Fotogalerioj kaj videoresumoj (inkl. kantojn en Esperanto) disponeblas en la muzeaj paĝoj ĉe ĈEA kaj ĉe Ipernity. - La aranĝo glate kaj bonetose trapasis; ĝi kontribuis al plifortigo de rilatoj kun la urbo, kie ĈEA havas sian sidejon kaj alportis ankaŭ financan enspezon. Informoj aperis en la urbaj gazetoj de Svitavy kaj Litomyšl (ricevataj senpage de ĉiuj lokaj familioj), sed bedaŭrinde sen intereso de la loka ĵurnalo kaj kablotelevido. Pli detala informo aperis en artikolo en Starto 2016/3.

**3. 3. 4. Kunlaboro kun landaj asocioj**

Por doni unu sukcesan ekzemplon, en aŭgusto la prezidanto V. Dvořák kun sia edzino P. Dvořáková kadre de sia libertempo private vizitis Vroclavon kaj tie ankaŭ sidejon de Silezia Esperanto-Asocio (la unua vizito okazis jam en 2014 kadre de IEF en Szczawno-Zdrój). Estis ligita konkreta kunlaboro koncerne Facebook kaj Esperanto-muzikon. La ĉefa konkreta rezulto estis septembra vizito de plena buso da partoprenantoj de IEF el Duszniki-Zdroj (la ĉefa aranĝo de SEA) en Litomyšl kaj en la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Pluaj du komunaj aranĝoj por 2017 planatas. - Tiu ĉi ekzemplo estu espereble inspira kaj instiga por plua agado ĉi-kampa.

3. Ekzemploj pri **internaciaj kontaktoj kaj kunlaboro de kluboj kaj sekcioj** estas menciitaj en la Raporto pri organizaj unuoj de ĈEA.

*Laŭ kongresaj prezentoj esperantigis Pavla Dvořáková*



# 4. Raporto de la UEA-ĉefdelegito por Ĉeĥio

En la tempo de la ĈEA-kongreso estis en Ĉeĥio 94 individuaj membroj de UEA (IM), inter ili 3 dumvivaj kaj 2 honoraj membroj. Ĉi-jaran UK partoprenis 66 membroj, kio estas 70.21%, kaj aliĝis 35 novaj IM, sed 30 el pasinta jaro ne renovigis sian membrecon. Preskaŭ ĉiuj novaliĝintoj partoprenis la 101an UKon en Nitra kaj 70% de tiuj, kiuj ne renovigis sian membrecon, partoprenis la jubilean UKon en Lille.

De tio klaras, ke multaj esperantistoj aliĝas kiel IM nur pro la pli granda rabato en la aliĝkotizo ol kiom estas la membrokotizo MJ (membro kun Jarlibro, la plej malalta membrokategorio, kie rajtigas je la rabato ĉe la servoj de UEA). Pro tiu fakto, kaj ĉar venontjare la UK okazos en fora Koreio, estas granda danĝero de falo de la ĉeĥaj IMoj en 2017.

Tial mi petas la nunajn membrojn kaj apelacias al tiuj, kiuj hezitas: Membreco en UEA ne estu konsiderata nur ilo por ŝpari monon en la jaro de UK-partopreno! Komprenu, ke UEA estas la plej multnombra, tut-monda, neŭtrala organizaĵo, plenumanta precize ideojn de nia majstro L. L. Zamenhof kaj eĉ se vi ne bezonos ĝin por ŝpari, ekzemple aliĝante al la UK aŭ mendante librojn ĉe la UEA-libroservo, certe vi povas ĝui iuspecan senton de fiero, apartenante al tiu elstrara monda Esperanto-Asocio.

Kaj eĉ pli tio valoras por la UEA-delegitoj, kiuj ofertas siajn servojn (ne monon, ankaŭ ne tro da tempo) por aliaj kolegoj ene de la UEA-membraro. Kompreneble, male ol membreco de UEA, kiu estas malfermita al ĉiuj interesiĝantoj, do ankaŭ al komencintoj, la funkcion de la delegito, ev. faka delegito, povas plenumi nur persono kun bona lingva scio. Se vi plenumas tiun kondiĉon, estas jam almenaŭ du jarojn IM kaj interesiĝas pri eniro en la delegitan reton de UEA, ne hezitu, la plej unika reto de esperantistoj estas malfermita ankaŭ por vi.

Pli da informoj pri la membreco de UEA (membrokategorioj, kotizoj, rajtoj, ktp.), same kiel pri la delegita reto de UEA (rajtoj kaj devoj de delegito, vicdelegito, fakdelegito) mi volonte sendos rekte al ĉiuj interesiĝantoj.

*Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz*

# PRI GRAVECO DE PAROLADO POR NIA LINGVO ESPERANTO

*(Resumo de la prelego de Anton Oberndorfer, realiganto de la projekto Esperanta Retradio, kadre de la 16-a ĈEA-Kongreso)*



Artefaritaj lingvoj estas skribo-bazaj lingvoj. Ili ne baziĝas sur la parolado kiel aliaj lingvoj, sed ilia fundamento estas skriba. Kaj por fariĝi vere vivanta lingvo ili bezonas la paroladon. Necesas verki tekstojn kiuj estu legataj de kapablaj homoj kaj necesas porti tiujn legatajn paroladojn al aŭskultema publiko. Tio devas okazi — por daŭre efiki — laŭeble ofte kaj regule kaj tio devas atingi homojn kun lingvaj kaj kulturaj fonoj el la tuta mondo.

Nur tiel la lingvo povas enradikiĝi en la cerboj de homoj, kiuj ŝatas lerni kaj praktiki la lingvon. Senparola legado de valoraj tekstoj ne sufiĉas, ĉar la homa cerbo nepre bezonas aŭdi la sonojn de lingvo por kapabligi la koncernan homon paroli tiun lingvon.

E-kongresoj kaj renkontiĝoj estas la lokoj por ĝui la kunestadon kun aliaj samlingvanoj kaj por tiel ankaŭ ĝui la lingvon. Do tiuj aranĝoj bonege servas por motivigi la homojn por daŭre praktiki la lingvon dum la cetero de la jaro. Plej gravas tiurilate la aŭskultado de radioprogramoj en Esperanto.

Tiaj programoj kompreneble ofertu interesajn enhavojn kiuj ĉiam denove allogas la homojn al aŭskultado. Ili devas alparoli la scivolemon de la homoj. Plej interesaj estas certe raportoj pri la vivocirkonstancoj de homoj en aliaj landoj. Jen kaj jen ankaŭ historiaj temoj povas kapti la atenton de la geaŭskultantoj, sed en la fokuso klare troviĝu temoj pri la mondo de hodiaŭ kaj morgaŭ. Se surbaze de tio funkcias regula aŭskultado de paroladoj en Esperanto, tiam iom post iom la nombro de homoj kiuj ne nur supraĵe parolas la lingvon, sed kiuj vere regas ĝin, kreskos, kaj tiam tiu nombro povos atingi nivelon kiu altiros pli da atento por nia lingvo. Tiam oni konsideros la lingvon Esperanto kiel valoran kontribuon por la plua evoluo de la homaro.

La novaj teknologioj ebligas porti la homan paroladon en la tutan mondon, sen geografiaj limigoj. Tamen ja estas limigoj. Tiuj limigoj estas ĉefe sociaj: Ne ĉiu povas aŭ volas interrilati kun ĉiu. Kaj estas lingvaj limigoj, limigoj de kompreno. Tiujn limigojn Esperanto ne aŭtomate forigas. Kiel ni ĉiuj scias, porti Esperanton al la homoj estas longdaŭra kaj pena entrepreno.

Sed nun almenaŭ eblas porti nian lingvon al homoj en la tuta mondo, precipe ankaŭ al homoj en lokoj kie Esperanto ne jam havas tradicion. Kaj tio eĉ apenaŭ kaŭzas kostojn. Necesas tamen por tio esperantistoj kiuj sin dediĉas al tiu tasko. Oni povas produkti kaj publikigi en la interreto instrumaterialojn pri la lingvo kaj eblas same produkti ĉiuspecajn materialojn en Esperanto, simple por legi kaj aŭdi praktikajn ekzemplojn en nia lingvo.





Eblas porti altkvalitajn paroladojn al homoj kiuj tiel ricevas daŭran kontakton kun nia lingvo, longan tempon antaŭ ol ili renkontas aliajn esperantistojn. Tiu alportado de paroladoj similas al radio, oni povas konsideri ĝin radio.

La Esperanta Retradio havas ĉefe edukan celon. Tio postulas sindediĉon ĉe la geaŭskultantoj kaj por multaj tiu defio estas tro granda kaj ili rezignas post komenca entuziasmo. Sed tio ne ĝenas. Ne estas la celo maksimumigi la nombron de aŭskultantoj, sed iom post iom levi la konscion pri la lingvo. La lingvo ne nur estas helpilo por pasigi libertempon kun saminteresuloj, sed la lingvo havas veran praktikan valoron. Tial la sonartikoloj de la Esperanta Retradio apenaŭ pritraktas temojn el la socia sfero de la esperantistoj, sed temojn kiuj povas esti interesaj por homoj ekster la esperantista komunumo.

---

esperanta retradio

Ĉiutage nova kelkminuta valora programo pri interesa temo kun paralela teksto por legi!
**http://aldone.de/retradio**



# Mia 3a
# Universala Kongreso de
# ESPERANTO

Nitra-Slovakio (23-30 julio 2016)

Ĉijare la 101a UK okazinta en Nitra-Slovakio. Mia KN estis 365. Julie mi sukcese ricevis vizon por vojaĝi Ĉeĥion invitita de Ĉeĥa amikino, ŝia nomo estas Věra Koloničná el Frýdek-Místek. Ŝi invitis min 30 tagojn kaj mi petis vizon en Havano, sorte nenian problemon mi havis por ricevi vizon.



*La aŭtoro kun s-ino Koloničná*

Mi vojaĝis Eŭropon la 16an de julio pere de Air Berlin kaj alvenis al Munkeno la 17an posttagmeze, tie akceptis min tieaj geesperantistoj, inter ili, s-ro Uli, Srino Sara Spano kaj S-ro Francesco Maurelli, ili volonte kaj zorgeme helpis min rilate al demarŝoj de biletoj por daŭrigi mian veturadon al Frýdek-Místek, Ĉeĥio.

Mi reveturis je la 17a kaj alvenis al Prago je la 22a pere de buso. Por daŭrigi mian veturadon al Ĉeĥio mi mem demarŝis mian trajnobileton al Frýdek-Místek. Mi prenis la trajnon dormis la tutan nokton, mi devis ŝanĝi la trajnon en Ostrava kaj preterpasis la haltejon, poste mi devis preni alian trajnon, mi estis tute perdita en vilaĝo Chotěbuz, sed fine mi povis atingi mian celon, mi alvenis al Frýdek-Místek lunde la 18an/7 matene kaj tie atendis min mia amikino Věra. En Ĉeĥio mi vizitis la urbojn Bartošovická kaj Svitavy (urbo kun 760 jaroj) kie troviĝas la Esperanta Muzeo de Svitavy, tre riĉa kaj interesa muzeo rilate al la tiea historio de Esperanto, bonega muzeo…

Mi restis 5 tagojn en Ĉeĥio kaj la 23an/7 matene ni veturis al Nitra por la 101a UK…





*La aŭtoro kun Mark Fettes*

Mia 3a UK por mi ankaŭ estis bonega kaj belega, tre interesa kaj alloga, riĉa kaj abunda programo ne mankis. La 23an/7 vespere okazis la kutima movada foiro kie geamikoj renkontiĝas kaj interŝanĝas. La 24an/7 je la 10a matene

atendis nin la Solena Inaŭguro, en granda salono sidis denove ne nur Angloj kun Francoj nek Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj, fidelaj kaj fieraj geesperantistoj al nia belega lingvo. Post kanti la Esperantan Himnon la 101a UK estis oficiale inaŭgurita je la 12a de la prezidanto de UEA.




La urbo Nitra estas tre bela, mi promenis multe kaj vizitis multajn lokojn. La urbo estis bele ornamita pere de Esperantaj flagoj. Merkrede kiel kutime multaj ekskursis dise, mi ekskursis al Bratislavo, ĉefurbo el Slovakio, ankaŭ laŭ mia opinio ĝi estas belega kaj interesega urbo, ni vizitis la kastelon de Bratislavo kaj de tie oni povas ĝui la grandegan riveron Danubo. Ni ankaŭ vizitis la Danuban Muzeon pri arto, belega kaj bonega muzeo.



7 tagojn mi restis en Nitra kaj la antaŭlasta tago okazis komuna fotaro, kie ĉiuj gesamideanoj kuniĝis por modernigi fotojn.



Por disvastigi Esperanton okazis marŝado, tiu marŝado estis unika ĉar haltigis la trafikon kaj multaj neesperantistoj ankaŭ akompanis nin, ĉiuj estis tre feliĉaj kaj fieraj portante la Esperantan Flagon, kantante kaj dancante dum la marŝado. Sabaton la 30an/7 okazis la Solena Fermo jam ne ĉeestis multaj geesperantistoj ĉar multaj revenis hejmen, sed ankaŭ ĝi estis tre impona kaj ni sentis la grandan senton de Esperanto kaj ĝia graveco por la tutmonda komunikado. Kantinte la Esperantan Himnon ĉiuj gesamideanoj adiaŭiĝis feliĉe kaj ĝoje post bonega semajno denove en Esperantujo.

*Guillermo Bes Salazar*
*fotoj de la aŭtoro*



## SEMAJNFINA RENKONTIĜO DE LA IKUE – KATOLIKA SEKCIO DE ĈEA EN VRANOV APUD BRNO



En la tagoj de la 16-a ĝis la 18-a de septembro 2016 kolektiĝis 25 personoj kadre de la tradicia semajnfina renkontiĝo, kiun nunjare la IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA organizis en la ĉefa Maria-pilgrimloko de la diocezo Brno en Vranov apud Brno. La partoprenantoj de la renkontiĝo loĝis kaj okazigis la programojn en la tiea Spirita Centrejo de la monaĥejo de la Ordeno de Sankta Francisko el Paola, situanta meze de belega naturo. Ĉeestis gesamideanoj ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Kroatio, Slovakio kaj Italio.

La Ordeno de la Sankta Francisko el Paola – la paŭlanoj, kiuj restadis en Vranov apud Brno en la jaroj 1633-1784, povis ĉi tien reveni post pli ol ducent jaroj en la jaro 1992. Ekde la jaro 2000 ili ekfunkciigis la Spiritan Centrejon kaj la unua renkontiĝo de nia sekcio tie okazis antaŭ ok jaroj, do en la jaro 2008. La nunjara estas do la dua tiuloka renkontiĝo de la IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA.

Vendrede posttagmeze okazis alveno kaj loĝigo de la partoprenantoj. Post komuna vespermanĝo kolektiĝis la ĉeestantoj en la kapelo de la Baziliko de la Naskiĝo de la Virgulino Maria, por kune kun parohanoj preĝi la rozarion kaj ĉeesti la sanktan meson. Kun la pastroj – paŭlanoj kuncelebris ankaŭ nia sekciano sac. Max Kašparů. Poste sekvis vespera programo en la salono kun projekciado el la pasintjara renkontiĝo en Třeboň kaj Bibliaj Tagoj okazintaj en Tuchoměřice (apud Prago) kaj Vroclavo (Polando), por vivigi rememorojn pri tiuj ĉi belaj okazintaj aranĝoj.

Sabata mateno estis komencita per rozaria preĝo en la kapelo de la Spirita Centrejo, kiun ni dediĉis al la en la 10-a de septembro forpasinta karega esperantistino kaj longjara fidela IKUE-anino D-rino Magda Šaturová el Bratislava. Dum ŝia prezidantado de la Slovakia IKUE-Sekcio, okazis ankaŭ tre vigla kunlaboro inter la ĉeĥa kaj slovakia sekcioj. Ŝi ankaŭ estis longjara legantino de la revuo Dio Benu, eĉ dum periodo, kiun ŝi pasigis ĉe sia filino en Francio.

Post la matenmanĝo okazis interesega, kiel ĉiam, prelego de s-ano Max Kašparů. Kaj post la prelego okazis en la kapelo de la Spirita Centrejo la esperantlingva primicia sankta meso celebrita de sacerdoto Max Kašparů, kiu – estante la grekkatolika pastro, ricevis esceptan permeson de la vatikana Kongregacio por Orientaj Eklezioj mescelebri publike ankaŭ en rom-katolika rito. Do la unuan fojon li havis la eblecon mescelebri ankaŭ en Esperanto. Dum la sankta meso ni ankaŭ memoris pri la mortintaj gesamideanoj, precipe pri la jam menciita D-rino Magda Šaturová kaj ankaŭ pri la mortinta en la 30-a de aŭgusto ĝisfine fidela membrino Věra Čudková. Danke al Dio, la katolika sekcio nune havas aktivantan sacerdoton por celebro de la esperantlingvaj sanktaj mesoj.

Posttagmeze okazis konatiĝo kun la pilgrimloko kaj precipe kun la Baziliko de la Naskiĝo de la Virgulino Maria, konstruita en la jaroj 1617-1633. Sur la ĉefa altaro de la baziliko estas ĉarma statuo de la Patrino de Dio de Vranov el ĉirkaŭ la jaro 1500. La nune grava pilgrimloko laŭ tradicio estiĝis en la jaro 1240, kiam landa oficisto Vilém je propeto de la Dipatrino reakiris vidpovon. Dankeme li tie konstruigis lignan preĝejon, al kiu de tiam komencis pilgrimadi homoj por honori la Virgulinon Maria kaj pere de ŝi elpeti Diajn gracojn kaj helpon. La nuna preĝejo estas unika monumentaĵo de la frua baroko.



Post la almenaŭ supraĵa konatiĝo kun la pilgrimloko Vranov sekvis prelego de la s-anino Marija Belošević – la viprezidantino de IKUE pri la Jaro de Dia Mizerikordo. Enkonduke estis projekciita prezentaĵo de la s-ano Vitor Luiz Rigoti dos Anjos el Brazilo je la temo "Praktikado de la Faroj de Korpa Mizerikordo en Brazilo". Ankaŭ okazis mallonga kromordinara konferenco de la katolika sekcio.

Post vespermanĝo povis okazi sepdekminuta projekciado pri la 69-a Kongreso de IKUE okazinta julie en la slovakia urbo Nitra. Ankaŭ okazis projekciado pri la 63-a Kongreso de IKUE okazinta en la jaro 2010 en Parizo, en centjara jubileo de fondo de IKUE en Parizo.

Dimanĉe post matena rozaria preĝo kaj matenmanĝo la ĉeestantaj ges-anoj de la renkontiĝo partoprenis pilgriman sanktan meson en la plenŝtopita de la pilgrimantoj baziliko. La ĉefcelebranto estis konata ĉeĥa sacerdoto František Lízna, kiu estis dum komunista regado en tiama Ĉeĥoslovakio malliberigita kune kun Václav Havel, kiu post falo de komunista regado iĝis ŝtatprezidento. Post la sankta meso en granda salono pastro František Lízna rakontis pri siaj naŭ perpiedaj pilgrimoj, el kiuj la plej longaj estis la sanktjakoba pilgrimo al Santiago de Compostela en Hispanio kaj la perpieda pilgrimo al Krimeo. Post komuna tagmanĝo estis la nunjara tradicia renkontiĝo de la katolika sekcio finita. Nun estas la tasko trovi konvenan lokon por la venontjara tradicia semajnfina renkontiĝo en Ĉeĥio.

Dankon al ĉiuj, kiuj la nunjaran renkontiĝon en la pilgrimloko Vranov apud Brno partoprenis. Dankon al la eksterlandaj gastoj Marija, Kreŝimir kaj Paŭlo. Dankon al la prelegintoj Max kaj Marija kaj al sac. Max ankoraŭ dankegon pro la esperantlingva mescelebro. Mi estas konvinkita, ke per nia ĉeesto en la belega Maria-pilgrimloko ni elpetis Dian benon por niaj pluaj aktivadoj kaj la konstantan ŝirmon de la Virgulino Maria arde honorata ankaŭ en Vranov.

La Virgulino Maria de Vranov propetu por ni!

*Miloslav Šváček*

# Ĉeĥaj esperantistoj-fervojistoj konferencis



*Antaŭ la ekskurso al Drásov*

De la 23a ĝis la 25a de septembro 2016 okazis konferenco organizita de la Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio. Ĝi okazis ene de bela pejzaĝo, en sindikata fervoja ripozejo Prudká en suda Moravio. Ĝin ĉeestis 41 partoprenantoj, krom ĉeĥoj ankaŭ gastoj el Aŭstrio, Francio kaj Slovakio.


*Aŭtografado de Martin Stupping*

En la programo estis krom la fakaj prifervojaj prelegoj ankaŭ informa prelego pri la venonta kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) en la franca urbo Colmar kaj tre interesa prelego de la aŭtoro de la libro "Home en senhomeco - Militimpresoj", honora membro de IFEF Martin Stuppnig (AT), kiu klarigis la fonon, kial li komencis verki siajn militrememorojn nur preskaŭ naŭdekjara, komence instigita de sia nepino nur por siaj posteuloj, kaj kiel el tiuj rememoroj fariĝis libro, unue en la germana, sekve ankaŭ en Esperanto. Lian prelegon sekvis aŭtografado.


*Ĝardena fervojo en Drásov*

Sed oni ne nur traktis en la salono, sed ankaŭ ekskursis. Kiel decas al fervojistoj, ili trajne veturis al proksima Drásov kaj tie vizitis tre interesan subĉielan muzeon "Ĝardena fervojo".

*Teksto kaj foto(j) Petro Chrdle*



*Veturo tra la ĝardeno en historiaj vagonetoj*

Se vi volus viziti la Ĝardenan fervojon kun viaj infanoj, rigardu ĝian retejon

**http://www.zahradni-zeleznice.info/**

# Koncerto de Mirek Smyčka

Karaj samideanoj, sabate la 19an de septembro mi partoprenis koncerton omaĝe al la 90jara vivjubileo de nia samideano Miroslav Smyčka. Koncerto okazis en unu el malgrandaj teatroj en Prago - "U Valšů" (Karolína Světlá-strato), proksime de la Nacia Teatro.



*Mirek kaj Jolana*

Mirek kantis ne nur sola, sed poste ankaŭ kun sia filino Jolana kaj ankaŭ kun sia bofilo Richard Haan, kiu estas konstanta membro de ensemblo de ŝtata operejo en Prago. La koncerto estis tre neformala, tre agrabla, ne nur por spektantoj, sed certe eĉ por la jubileanto.

Neniu seĝo en la spektejo restis libera. Post kiam koncerto finiĝis, gratulis al Mirek oficialaj gastoj, poste sekvis ni, liaj esperantaj geamikoj. Mirek tre tre miris, kie eĉ mi aperis inter aŭskultantoj (spektantoj) el tiom malgranda vilaĝo Strašov, kie mi jam pli ol sep jaroj vivas kune kun la edzino, forlasinte Ústí n. L. en 2009.

Estis videble, ke M.S. tre ĝojiĝis de tioma kvanto da geesperantistoj, ekz. Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Pavel Polnický, Jan Řepa (Fidel), Margit Turková, Jindra Dubinová kaj pluaj, kiujn mi ne konas. Ne mankis eĉ Kateřina Kudlíková kune kun sia patrino. Kateřina preskaŭ neniam mankis kiel kantistino en programo de niaj Internaciaj kulturaj festivaloj en Ústí n. L.

Post la koncerto ni estis invititaj en "teatran klubon" (en la subterejo), kie daŭrigis amuzo, diskutoj, eta manĝado + trinkado. Mirek estis tiutempe evidente tre kontenta. Je la 18a horo, mi dankis al Jolana (la filino de M.S.), kiu kun sia edzo Richard Haan apartenis al tiuj, kiuj preparis por la jubileanto tiom agrablan kortuŝan antaŭvesperon ... poste mi disadiaŭis, rapidante al ĉefa stacidomo, de kie mi vojaĝis pertrajne al Přelouč kaj de tie peraŭte hejmen. Mi ĝojas, ke mi tute ne hezitis partopreni tiun ĉi feston omaĝe al mia iama kolego el E-klubo en Ústí n. L., kiu estis por tiama vigla kluba aktiveco ĉiam laborema, oferema, bonkora kaj nepre senprofitema.

Mirek diris publike, ke li ĝuste ŝanĝas sian loĝlokon el České Budějovice (Domo kun flegservo) al Prago - certe pro tio, ke li estu pli proksime al la familio de sia filino Jolana. Laŭ mia opinio li jam nun fariĝis pragano. Li konfesis, ke li nun ne tro ofte legadas e-mesaĝojn en sia retkesto. Se li ne reagis al viaj gratuloj, ne estu trista - same li ne reagis ĝis nun al la mia. La afero estas por vi ĉiuj komprenebla.

Mi faris dum la koncerto kelkajn ne tro sukcesajn fotojn - kialo estas jena: dum kantado mi ne volis ofte uzi fulmon (posedante simplan aparaton). Almetite mi ilin sendas al vi.
http://jopek.rajce.idnes.cz/Mirek_Smycka-koncerto_en_Prago-90#

*Josef Kříž*

# OMAĜE AL JIŘÍ KAREN

Enkadre de ĉiujaraj TAGOJ DE POEZIO en Prago okazis la vespero "Renkontiĝo kun la poeziverkaro de Jiří Karen". Organizis ĝin kultur-prizorgantoj de la kvartalo PRAHA 10, kies estis Jiří Karen kaj lia edzino Zuzana longjaraj loĝantoj. Ĉar grava parto de la prezentado estis ankaŭ la esperantismo de Jiří Karen, mi estis petata tuŝi kaj klarigi la temon, kaj ĉefe deklami kelkajn poemojn, kiuj troviĝas en esperanta traduko (en la volumo "Flugilhava ŝtono", eld. FONTO, Brazilo). Ĝojiga afero por mi (por NI) estis, ke jena temo estis preparita kun klara simpatio flanke de organizantoj.

Do, sur la ekrano troviĝis ne nur la verkoj de Jiří Karen, sed ankaŭ la nomoj de liaj, de niaj samideanoj - verkistoj: Eli Urbanová, Eva Seemannová, Josef Rumler, František Kožík... Tio igis min klarigi, ke kelkaj el ili same apartenis al la loĝantoj de la menciita kvartalo - hazarde ili vivis sur la sama strato kiel J.K. - Josef Rumler kaj František Kožík. Do, mi "instigis" la organizantojn laŭeble omaĝi ankaŭ tiujn ĉi famajn loĝantojn... "Ni ja intencas omaĝi František Kožík, kunlabore kun lia filino, sed ni ne sciis pri lia Esperanto-interesiĝo", ili diris. Do mi atentigis ilin, pri iama grava Esperanto-elsendado de la elsendejo BRNO, en kiu gravan rolon havis František Kožík. Tion ili kun ĝojo akceptis.

La tuta vespera programo estis registrita elektronike sur YOU-TUBE, laŭ la deziro de la edzino Zuzana, kiu loĝas en la pavilono por veteranoj, (Vojenské nemocnice, Praha) kaj liveris la materialojn pri Jiří el sia familia arkivo. Do, estas ĉefe ŝia merito de la sukcesplena omaĝo kaj ĉefe konservado de la afero. Je la 8-a de decembro ĉijare ŝi ĝisvivos sian 95-jariĝon. Okaze de la jubileo oni organizos similan vesperon, kiu enhavos la vivon de Zuzana kiel malliberulino en la prizonejo Terezín, kaj de Jiří, prizonulo por la devigaj milit-laboroj en Germanio. Pri tio li verkis memorlibron, kiu estas alte taksita pro liaj aŭtentaj sinceraj esprimoj. La libro estis tradukita en E-on de Jiří Patera, kaj poŝtupe publikigita en la Bulteno (de EK Prago).

La evento realiĝos je 1a de decembro, 18 hor., en la DOMO de LEGADO (Dům čtení), Ruská-strato, Prago.

Partoprenos ankaŭ la poetino Věra Ludíková, kiu estis editoro de kelkaj verkoj de JK (en la eld. Chronos, Ústí nad Orlicí) amikino de la geedzoj, kaj favoranto de nia esperanta afero. Ni rememoru ĝuste ŝian partoprenon de la kultura programo ĉe la pasintjara ČEA-konferenco en Ústí nad Orlicí.

Al ĉiuj supre nomitaj gravuloj mi dediĉas mian privatan rememoron kaj instigas ĉiujn legantojn rememoru ilin ankaŭ. Danke al ili estas nia ĉeha esperanto-movado spirite riĉa.

*Por STARTO skribis Margit Turková,*
*Novembro 2016*

# Evin atelier Vás zve

Na adrese www.evinatelier.cz najdete rubriku Esperanto a v ní např. Skokovy či **Vyprávěnky mladých esperantistů** z časopisu *Juna Amiko* přeložené do češtiny nebo se přihlaste na nástěnku Esperanto a sdílejte příspěvky.





https://cz.pinterest.com/evapankova/esperanto/

*E. Pánková, J. Drahotová*

# Ni gratulas

Oktobre atingis sian 95-an jaron sinjoro **Jaroslav Karhan** el Olomouc. Li okupiĝas krom Esperanto ankaŭ pri homekologio, ekumenismo, homaranismo.



Lian verkon **Vojo al harmonio – de Komenio al Zamenhof** vi povis legi en Starto 3/2013 – 3/2015 kaj ĉi-jare ĝi aperis libroforme, estis disdonata en UK Nitra kaj ĈEA-kongreso en Pelhřimov. Dum multaj jaroj li estis sekretario de EK Olomouc kaj kontribuis al Paco sub signo JK en rubriko Ekumena voĉo de paco, kiun li fondis.


**Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr**
Aŭtune 1906 naskiĝis du el niaj plej grandaj tradukmajstroj, kies tradukoj lastatempe aperis en libro Otokar Březina **Mistero de doloro** (2014).

Tomáš Pumpr estas konata pro tradukoj



de **Bapto de caro Vladimir** (Havlíček), **Bukedo** (Erben), **Majo** (Mácha), operoj **Najado** (Dvořák), **Vendita fianĉino** (Smetana), **En la puto** (Blodek) kaj pro liaj kontribuoj al Verda Stacio.

Jiří Kořínek tradukis centojn da poemoj



kaj oper-arioj. El ampleksaj verkoj ni menciu: **Manon Lescaut** (Nezval), **Jakobeno** (Dvořák), **Flugilhava ŝtono**, **Serĉado de blua tono** (Karen) kaj **Sur la sojlo de amo** (Procházková).

**Jaroslav Vrchlický (1853-1912)**

## Kristnasko

***el la ĉeĥa tradukis: Jiří Kořínek***

Voĉ' sonorila neĝojn kronas,
en for' ĝi softe perdas sin;
en koro ĉiuj kordoj sonas,
ĉar la juneco tuŝas ĝin.

Se inter arboj nur ekventas
glaci-kristaloj falas jen,
de tegmentar' glacio pendas,
kiel fajfiloj de orgen'.

Ter' kvazaŭ florus lili-bedoj,
teniĝas ĉie neĝtavol';
fenestre lum', sur vang' ridetoj,
ĉiele steloj laŭ di-vol'.

En ni malnovaj kantoj sonas,
kun ili sonĝ' pri l' kripa bril',
kaj ĉirkaŭ mia kap' alfonas
sinperda voĉ' de koltintil'.

En beatec' anim' plezuras,
suspir' profunda en la kor',
sonoroj sonas, lumoj brulas -
Kristnaska glor', kristnaska glor'!

## John Lennon

Vi diras, ke vi amas pluvon,
sed kiam pluvas, vi malfermas
pluvombrelon.
Vi diras, ke vi amas la sunon,
sed kiam ĝi brilas, vi serĉas ombron.
Vi diras, ke vi amas venton,
sed kiam ĝi blovas, vi fermas fenestrojn.
Mi antaŭtimas la momenton, kiam vi diros:
Mi amas vin.

*Trad. Věra Muchnová*

# Estiĝo de internacia kunlaboro

Komence de septembro 2016 skribe demandis min Teresa Pomorska el Pollando, ĉu 40 partoprenantoj de la renkontiĝo Duszniki - Zdrój povas la 16-an de septembro viziti la urbojn Litomyšl kaj Svitavy kaj Esperanto-muzeon. La klubanoj el Svitavy certigis restoracion en Litomyšl por komuna tagmanĝo kaj por renkontiĝo kun ceteraj esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo. Alveturis ankaŭ Liba Gabalda kun sia edzo, kiuj loĝas en Parizo.



Petr Jonáš ĉiĉeronis por ni laŭ urbaj vidindaĵoj, montris gravajn historiajn domojn, ni trarigardis la kastelon. Ni omaĝis la memoron de la esperantlingva verkisto Karel Píč kaj metis bukedon sur lian tombon. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ Robert Kamiński, kiu por UEA registras Esperanto-objektojn. La tombo de Karel Píč certe apartenas al tiaj objektoj.

Promenon tra Svitavy certigis Marie Minářová, kiu helpis interpreti al Esperanto jam en Litomyšl. Pli multe pri Svitavy eksciis la vizitantoj el filmo esperantlingve dublita.



Tio inspiris Teresan proponi plurtagan internacian renkontiĝon en Svitavy kunlabore kun la loka klubo. Entuziasmigis ilin la Ottendorfer-domo kaj bela akustiko de ĝia salono. Al siaj akompanantoj ili komune kantis. La preparoj por la renkonto jam komenciĝis. Ĉio devas esti sekurigita antaŭ la lanĉo de invitiloj en la mondon.

*Libuše Dvořáková*

## Asocio de esperantistoj – handikapuloj en Pardubice

elkore invitas vin al

# la 7-a internacia kongreso de AEH,

kiu realiĝos en Rekrea centro Zámeček (Kasteleto) en Hodonín ĉe Kunštát en la tagoj de 21-a ĝis la 23-a aprilo 2017 kun sekvanta lingva seminario ĝis 28-a de aprilo 2017.

**Devigan aliĝilon** por la 7-a kongreso de AEH sendu ĝis la 15-a de februaro 2017.

Adreso de la redakcio: Asocio de E-handikapuloj, Na Okrouhlíku 953/21, CZ 530 03 Pardubice, Ĉeĥa respubliko e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu

# Marie BŘEHOVÁ

**(1935-2016)**

La 15-an de septembro 2016 forpasis **Marie Břehová**, fraŭline **Kubáčová**, el



Velká Bystřice, kiu postlasis surprize riĉan traduklaboron. Esperanton ŝi eklernis en 1953 en Olomouc, kie ŝi laboris kiel farmacia laborantino. Modernan ĉeĥan literaturon ŝi komencis esperantigi por sia plezuro kaj ŝiaj tradukoj aperadis en pluraj gazetoj hejme kaj eksterlande. Ŝiaj plej amataj aŭtoroj estis Bohumil Hrabal, Karel Čapek, Ota Pavel kaj Jan Werich.

# Reinhard Haupenthal

**(1945-2016)**

La 29-an de septembro 2016 post longa suferiga malsano forpasis **Reinhard Haupenthal**, germana volapukologo, esperantologo, tradukisto kaj eldonisto, eksa akademiano. Li naskiĝis la 17-an de februaro 1945 en Kromach, studis lingvojn, teologion, filozofion kaj pedagogion, laboris kiel instruisto. Li eldonis ĉ. 290 librojn kaj broŝurojn en Esperanto aŭ en la germana pri Esperanto aŭ volapuko. Li klopodis ankaŭ pri kanonizo de prelato Johan Martin Schleyer, aŭtoro de volapuko.

# Bohumil Toman

(1927-2016)

La 25-an de novembro 2016 forpasis s-ro Bohumil Toman, honora membro de Esperanto-Klubo en Prostějov en aĝo de 89 jaroj.




## Česká esperantská mládež připravila nový kurz esperanta a na jaro připravuje jazykové semináře

# Chcete se silvestrovsky zasmát?

Přijeďte do České Třebové dne 29. 12. 2016 začátek v 19 hod. v malém sále Národního domu

Jmenovité přihlášky:
jk.esperanto@seznam.cz,
tel.: 721 869 054
220 Kč zasílejte na č. účtu:
165714933/300, VS: 2912

Kávičku a jiné tekutiny poskytne restaurace, stejně tak i přípitek a večeři.
Téma večera: „Veselé životní příhody a patálie“ Hudbou zpříjemní večer: Vojta Dárečky? ANO! Všichni všem!

Internát VOŠ a SŠT 465 508 449,
nadezda.vasinova@vda.cz

## Nova retejo de KAVA-PECH

Rigardu al www.kava-pech.cz por vidi la novan aspekton de nia fama eldonejo.

# Pri Zamenhof ĉine

Ĉinaj samideanoj planas eldoni en 2017 ĉinlingve serion da libroj priu Zamenhof kaj lia familio.

## Vinilkosmaj novaĵoj

Ŝatantoj de esperantlingvaj kantoj rigardu la retejon
http://www.vinilkosmo.com

# Jak platit svazu

## Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Předplatné časopisů

### Pozor! Změna adresy zprostředkovatele!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhraďte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč
**La Gazeto:** 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** nur reta versio 440,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4
**Juna Amiko:** 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 1280,- Kč (*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

# Sukcesan Zamenhofan jaron 2017 al ĉiuj niaj membroj kaj rondetoj!

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**47. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117**

**Uzávěrka příštího čísla**: 1.2.2017

---

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**
**47-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 1.2.2017

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# KALENDARO 2016

**2016-12-10** Renkonto de la Blindula Sekcio kaj la Klubo en Olomouc
**2016-12-29** Silvestro Česká Třebová
Info: jk.esperanto@seznam.cz

# KALENDARO 2017

**2017-02-24/26** Bestĝardeno 2017
Info: e-mentalprago@seznam.cz
**2017-03-17/19** La 11-a BIERo en Náchod
Info: e-mentalprago@seznam.cz
**2017-03-18** Jarkunveno de ĉeĥaj fervojistoj
Info: kovar.lad@email.cz
**2017-04-01** Regiona renkontiĝo en Česká Třebová Info: jk.esperanto@seznam.cz
**2017-04-21/28** Internacia Kongreso de AEH kun lingva seminario en Hodonín ĉe Kunštát
Info: aeh@esperanto-aeh.eu
**2017-04-28-05/01** 4-a CENTREJO Bartošovice
Info http://centrejo.esperanto.cz/
**2017-05-05/08** Regiona renkontiĝo en Zderaz, distrikto Chrudim. Info: dvor.libuse@seznam.cz
**2017-06-18** Ĉantorio
Info: suchanekj@seznam.cz
**2017-07-16/29** SET Lančov 2
**2017-07-30/08-11** SET Lančov 3
**2017-08-11/13** Renkonto de eksaj tendaranoj – jubilea, la 20a! en Lančov
Info: let.lancov@seznam.cz
**2017-09** Lernejo Bartošovice
Info: verdastacio@gmail.com
**2017-12-09** ANKRO (Antaŭkristnaska renkontiĝo) Písek Info: pisek@esperanto.cz
**2017-12-10** Marcipana Kristnasko
Info: svitavy@esperanto.cz

**ARANĜOJ EN NAJBARAJ LANDOJ**
**2016-12-03** Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio 2016 (Stolpen,Germanio)
Info: e-mentalprago@seznam.cz
**2016-12-17/18** 4-a Granda lokŝumado en Bratislavo, Info: e-mentalprago@seznam.cz
**2017-01-5/8** XXXV. Poludnica en Malaltaj Tatroj, Slovakio, Ĉefa temo: geokaŝado.
Info: poludnica83@gmail.com
**2017-02-01/05** Bibliaj tagoj en Lutterstadt Wittenberg
**2017-05-16/22** 69a IFEF-kongreso en Colmar, Francio, Info: http://ifef.free.fr
**2017-08-07/14** KELI-kongreso Zöblitz, Germanio



*La kongreso dankis al la eksaj komitatanoj geedzoj Dvořák pro ilia laboro*




Nova prezidantino Libuše Hýblová



*Riĉa kongresa libroservo*



*IKUE-renkontiĝo en Vranov apud Brno*



*Jan Řepa gratulas al la jubileanta Miroslav Smyčka en la omaĝa koncerto*



*Richard Haan kantas por M. Smyčka*



*Max Kašparů celebras meson en Vranov*



*En Vranov prelegis ankaŭ Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE, pri la Jaro de Dia Mizerikordo*